

## Popoldancoj kaj kantoj el la Harz-montaro

(kun aldonaj kanttitoloj)



La hejmkultura grupo **Harzklub Pöhlde** flegas la tradiciojn, folkloron de la Harz-regiono, ofte prezentante per kantoj kaj dancoj epizodojn de la regiona historio, rakontante pri legendoj, kutimoj kaj montrante scenojn el la iama ĉiutaga vivo de la loka loĝantaro, kiu vivis ĉefe el minado kaj agrikultura laboro.

(Kanto: *Lieder aus den Harzer Bergen*)

Ilia hejmvilaĝo **Pöhlde** situas ĉe la suda rando de la Harz-montaro, en pravaldo de rivereto Oder. Ĝi havas pli ol miljaran historion.

Ĉi tie festis la iamaj germanaj reĝoj kaj imperiestroj de tempo al tempo la kristnaskajn festojn.

La herbejoj tie estis falĉitaj dufoje en jaro, unue por fojno, due por postfojno.



Ĝis la komenco de la 1950-aj jaroj oni fojnis ĉefe permane. Post uzo de falĉilo oni dum sunbrilo per rastilo sternis kaj turnis la herbon por sekigi ĝin. Grand-agraruloj jam posedis maŝinojn por falĉo kaj turno, tiratajn de ĉevaloj kaj bovoj. Sed etaj produktantoj devis fojni permane.

Kanto: *Wenn vom Harzerland ich träume (Se mi sonĝas pri Harz-lando).*

Laŭ kronikoj jam en la dekkvara jarcento oni dancis en la Harz-montaro. La tradicio de popoldancado estiĝis el entuziasma vivoĝojo.

La dancojn ili prezentis eĉ uzante ilojn por agrikultura laboro: ekzemple **rastilon** aŭ **draŝilon**.



Danco: *Harkentanz*  
Kanto: *Dreschflegel*

Jen alia danctipo por virinoj, en kvadrata formacio, bone plenumbla ankaŭ por la pli maljuna generacio pro la ne tro rapidaj, trankvilaj, tamen elegantaj paŝoj. Pro la multaj kombinebloj de la pozicioj kaj movoj, paŝoj de la kvar dancistoj tiu danco estas prezentbla tre varie kaj spektakle.



*Rozodanco (Rosentanz aŭ Viereck)*

La monto **Brocken** estas la plej alta en la Harz-montaro kaj norda Germanio.

Alteco de la pinto estas 1142 metroj. Post 1960 la monto longdaŭre estis militbarita regiono. Sovetia armeo kaj organo por ŝtatestekureco de Germana Demokratia Respubliko konstruis fortikaĵon kun muro kaj spionaj instalaĵoj. Eblis kaŝe aŭskulti malproksimen en okcidentgermanan teritorion.



Ekde la 3-a de decembro 1989 la pinto denove estas libere atingebla. Tiun tagon ĉirkaŭ 2000 homoj marŝis tien kaj manifestaciis por la malfermo de la ĝis tiam barita teritorio. Intertempe la militaj instalaĵoj estas komplete forigitaj.

La tuta tereno estas en la Nacia Parko Harz. Surloke de la iama muro nun troviĝas ringoforma turista vojo ĉirkaŭ la pinto. Moskeosimila konstruaĵo, iam por spionado, nun enhavas muzeon kaj ejojn por ekspozicioj kaj prelegoj. La televida turo enhavas nun ankaŭ hotelon kun kafejo kaj grandan terason por havi de tie belan panoramon de la montaro.



Nur unufoje jare – en la t.n. Valpurga nokto (30a de aprilo-1a de majo)– la limo inter ambaŭ germanaj ŝtatoj estis tralasa, por ke ankaŭ ‘okcidentaj sorĉistinoj’ povu atingi ‘orientajn diablojn’.

Laŭ la mezeŭropaj legendoj pri sorĉistinoj, la monto havas la literaturan nomon Blocksberg - en Esperanto Blokmonto - kaj estas la loko, en kiuj ĉiuj mezeŭropaj sorĉistinoj kolektiĝas en la Valpurga Nokto kaj sur siaj flugaj balailoj ĉirkaŭas grandegan fajron. La scenon sur la monto priskribas inter alie la dramo Faŭsto de Johann Wolfgang von Goethe, kaj ankaŭ la infana libro La malgranda sorĉistino de Otfried Preussler, kiu estas klasikaĵo ne nur en la germanlingva, sed ankaŭ en esperanta traduko en la esperantlingva infana literaturo.

...



Dum la folkloraj  
prezentadoj de  
Harzklub Pöhlde  
aperas sorĉistino sur  
balailo.

*Brocken-sorĉistino"*  
*(Brockenhexe)*

*Brocken-kanto*  
*(Brockenlied)*



Jen kelkaj aliaj objektoj uzataj dum la koncertoj de Harzklub Pöhlde, ja ili rilatas al la kutimoj en la Harz-montaro.

**Vipon** oni uzis ne nur por perbate direkti tirbestojn, sed ankaŭ por komunikado inter koĉeroj.

Dum antaŭa tempo en Harz ekzistis ne asfaltitaj ŝoseoj, sed nur vojoj larĝaj por unu veturilo.

La supreniranta veturilo havis prioritaton. La kontraŭa trafiko devis atendi en preterpasejoj. La laŭta sono de lerte uzata vipo anoncis la proksimiĝon de ĉevalĉaro.

*Vipo-konzerto (Peitschenkonzert)*



Kantoj: *Kun vipokrakado trans montojn*  
*(Über den Bergen mit Peitschenknallen)*  
kaj *Al mia hejmo (Nach meiner Heimat)*



**Citra** estas malnova Harz-regiona muzikinstrumento.

Dum tempoj sen radiaj disaŭdigo kaj televido, post farita laboro oni prenis tiun mallaŭtan instrumenton kaj hejme muzikis.

Kelkaj muzikistoj ankoraŭ lerte uzas tiun raran instrumenton.

Kanto: *Verdaj montoj (Grüne Berge)*

Ekde jarcentoj oni paŝtas bovojn, ŝafojn, kaprojn kaj porkojn sur grasaj herbejoj en la Harz.

Gregon da bovinoj oni nomis ankaŭ "Harca sinjorin-orkestro", ĉar la bestoj portis sonorilojn ĉirkaŭ siaj koloj. Intertempe tio apartenas al pasinteco.

En la folkloraj artprezentadoj aperas paŝtisto en sia tradicia kostumo kaj kun akordigita **sonorilaro**. La diversgrandaj sonoriloj havas siajn nomojn: *Supra Stumpo, Stumpo, Duonstumpo, Krombatilo, Ŝafida Sonorileto, Sonanta Tabulo* kaj *Bovida Sonorileto*.



Kanto, sonoriloj: *Mi estas paŝtistoknabo (Bin ein Hirtenbub)*  
*Ruĝmonta danco (Rotenberg Tanz aŭ Tampet)*

Estas interesa ankaŭ la prezentado de *tipaj profesioj* el la Harz-montaro, dum kiu la kantistoj imitas profesiajn movojn.

La profesio "**lignokarbisto**" preskaŭ mortis en Germanio.

Dum antaŭaj tempoj karbista vivo estis malfacila kaj soleca – ĉiam en kabano, proksime de lignokarbigejo.

Ĝis la 20-a jarcento karbistoj en foraj regionoj uzis sonantajn tabulojn el fagoligno kiel alarmilon kaj informilon.

En kelkaj regionoj de la mondo la malnova lignokarbista metio ankoraŭ nuntempe ekzistas, en Herzberg nur fare de tradici-konservaj asocioj.



*Karbista klaĉado (Köhlerkatschen)  
Maljuna bufo (Die alte Kröte)*



Fine ni montras la tradician viran kaj virinan vestaĵojn, kiujn oni surmetas dum artprezentadoj kaj gravaj lokaj festoj.

Ni ĝojas, ke per invito de eksterlandanoj al Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo, per organizado de internaciaj Esperanto-renkontiĝoj ni povas doni eblon al folkloraj grupoj, kiel Harzklub Pöhlde, montri lokajn kutimojn, prezenti regionan popolar-ton.

Ni zorgas ankaŭ pri tio, ke ni engaĝu ankaŭ la junan generacion, ke ili povu lerni pri la pasinto, pri la konservado de kulturaj valoraĵoj.

*Laŭ tekstoj de Anja  
Stefan-Lange de  
Harzklub Pöhlde kaj  
informoj el Vikipedio  
kompilis: Zsófia  
Kóródy*

*Fotoj: Zsófia Kóródy  
(Interkultura Centro  
Herzberg)*

